

SUDFRANCIA ★ STELO

N° 170 – 3a kvaronjaro 2004 – 3° trimestre 2004 – 1 € 50

☆☆
Dulingva bulteno eldonita de la Esperanto-federacio de Langvedoko-Rusiljono
Bulletin bilingue édité par la fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon
Jarabono/Abonnement : 6 € al p^{ck}/au CCP 956-28 P Montpellier (fédé d'E°)
☆☆

Parlez-vous européen ?

*Sous ce titre, est parue dans « Le Monde », le dimanche 26 septembre, à l'occasion de la journée européenne des langues, une page sur l'espéranto, offerte de nouveau par M. Etsuo Miyoshi (Japon), que l'on peut remercier à l'adresse : e.miyoshi@swany.co.jp
A défaut de la page complète, voici le paragraphe d'introduction et quelques arguments utilisés.*

La politique officielle de l'Union Européenne vise l'égalité des droits de toutes les langues officielles.

Dans les faits, cependant, le privilège accordé à une seule de nos langues nationales, l'anglais, met en danger la diversité culturelle qui est une des richesses de l'Europe.

L'élargissement conduit à augmenter les dépenses considérables de traduction et d'interprétation (plus d'un milliard d'euros par an actuellement) et à renforcer la domination de l'anglais au sein des institutions européennes en favorisant l'usage de la "langue-pivot" la plus puissante, d'où des privilèges et des discriminations injustes et inacceptables.



L'espéranto : une langue facile et précise. Marjoren, Maja, Zdravka et Tina, de trois pays différents, au cours du congrès de Tel-Aviv en 2000. Des milliers d'enfants, dans le monde, pratiquent activement l'espéranto comme leur deuxième langue maternelle.

MI AMAS LA VIVON : J'AIME LA VIE

L'espéranto a une orthographe phonétique et sa grammaire est régulière, sans exception. Toutes ses racines sont naturelles, puisées dans les principales langues européennes. Ainsi, nous pouvons reconnaître la plus grande partie d'un texte en espéranto. Nous pouvons l'assimiler très vite et le mettre en pratique de manière active dans la conversation et pas seulement d'une manière passive dans la lecture.

Si l'apprentissage de l'anglais exige en moyenne 2000 heures d'étude, 200 heures d'espéranto suffisent pour acquérir le même niveau de connaissance et pour avoir la certitude de mieux se faire comprendre.

L'espéranto est enseigné dans des cours privés, des écoles, des universités, sur internet et par correspondance.

Des stations de radio émettent régulièrement en espéranto dans

12 pays dont le Brésil, la Chine, la Pologne, l'Italie... Plus d'une centaine de magazines et de journaux sont régulièrement publiés dans cette langue, et un nouveau livre paraît chaque jour.

Sur internet, plusieurs centaines de listes de diffusion et des dizaines de milliers de sites existent en espéranto.

L'Association Mondiale d'Espéranto (Ŭ.E.A.) est à votre service. L'Ŭ.E.A. compte 20000 membres dans 117 pays et bénéficie de relations consultatives avec l'Unesco.

De plus amples renseignements sur : <http://www.esperanto.net>.

AIMEZ-VOUS LES VOYAGES ?

L'association Mondiale des Jeunes Espérantophones dispose d'un réseau d'accueil chez l'habitant, nommé "Pasporta Servo". Pour 2004 on y trouve la liste de 1286 familles dans 80 pays qui proposent un hébergement gratuit aux voyageurs espérantophones.

AIMEZ-VOUS LES CONTACTS HUMAINS ?

Des centaines de rencontres et festivals sont organisés chaque année, bien sûr sans interprète. En particulier les Congrès mondiaux annuels : en 2003 à Göteborg en Suède, en 2004 à Pékin, en 2005 à Vilnius en Lituanie. Le congrès du centenaire de l'espéranto, en 1987 à Varsovie, a rassemblé 5946 espérantophones.

POUR TOUTE INFORMATION :

Espéranto-France
4bis rue de la Cerisaie
75004 PARIS

Tél : 01 42 78 68 86. Fax : 01 42 78 08 47
Courriel : info@esperanto-france.org
Site : www.esperanto-france.org

Dernière minute : le texte complet de la page du « Monde » peut être lu et imprimé à l'adresse internet <http://lingvo.org/fr/4/995>



Association Mondiale d'Espéranto

www.uea.org



www.esperanto.net

Aùtuna kunveno de la 4a de septembro en Béziers (resumo)

En kursivoj aldonaj rimarkoj kaj novaj informoj

Partoprenis 20 personoj . Post bonvenigaj vortoj, la prezidanto J. Hénin disdonas la tagordon kaj klarigas la kialon de tiu datŝanĝo . La lasta SFS malfruis, ĉiam pro la sama kialo : nerespekto de la limdato . Por ĉiu decido hodiaŭa estos respondeculo . En 2005 ni kongresos sabate . Konsiderante la datojn de la kongreso de Boulogne sur Mer kaj de la paskaj ferioj, nur eblas **sabato, la 9a de aprilo** . Ni kunvenos en **Lunel** ; prizorgos la aferon Georges Gonthier kaj Josée Boccadifuoco (JB). Pri la financa helpo al « Ĝangalo » (200^E) prizorgos nia kasistino Lucette Négron . Kongreso de La Roque d'Anthéron : JH rapide raportas, ĉar SFS jam raportis . Interesas nin pli speciale la preparado de membrolibro kun aktualaj adresoj kaj de novaj paneloj por forumoj kaj ekspozicioj (aĉeto antaŭvidebla) . La organizantoj de la staĝo de Vias estas kontentaj malgraŭ la problemoj ĉi-jare (kongreso samtempe) . Bedaŭrinde ni malofte renkontas la ĉeforganizanton por havi pli da detaloj pri la bilanco kaj la preparlaboroj . **Staĝo en 2005 : de la 18a ĝis la 25a de majo** . Koncerne la eldonon de poŝtmarko pri la 100a datreveno de la kongreso de Boulogne, JH sendis al la poŝto dosieron kaj ricevis respondon, kiun li legas . *La listo de la poŝtmarkoj eldonotaj en 2005 aperis kaj ne estas antaŭvidita poŝtmarko pri esperanto (male estos unu pri la 100a datreveno de « Rotario internacia », de la leĝo de 1905 (rilatoj inter la ŝtato kaj la eklezio), de la veturilkurado «Gordon Bennett »...* Biblioteko en Lunel-Viel : Christian Mouré (CM) listigis la librojn . Post iom da tempo eblas al ĉiu membro de la federacio pruntepreni librojn . Al la jam ekzistantaj libroj eble aldoniĝos tiuj de Nîmes kaj la federacio kompletigos . Jarfina pikniko : Gilbert Santos (GS) esploras por trovi taŭgan lokon inter Béziers kaj Montpellier kaj la dato estos indikata sufiĉe frue . Mado Vidal (MV), Marithé Lemaire, Marie-Blanche Fondrillon kaj Ges. Bernard renkontis skoltajn fine de aŭgusto . Interesaj kontaktoj, necesus informoj por instrui esperanton pere de ludoj (Mado + Marie-Blanche). *JH konfirmis adresojn de gejunuloj, kiuj kompetentas, unu loĝas en Tuluzo, oni kontaktu ŝin* . Aĉeto de libroj por la skoltaj : ili mem aĉetu kelkajn (albumojn) kaj la federacio aĉetos kelkajn ankaŭ . Neniu federaciano partoprenis en la UK de Pekino (pli ol 2000 ĉeestantoj) ; Céline, la filino de Ges. Bernard partoprenis ; raporto aperos en «E^o Info» . JH partoprenis la kongreson de Bilbao (EEU), li raportos en SFS . Li disdonas la rezolucion adoptitan . Semajno de Sète : 40 personoj, inter ili 15 geknaboj . Jean-Pierre Peray kaj JB gvidis kurson, Renée Triolle ankaŭ instruis . Line Maurel kaj Geneviève Gaubert raportas pri Bouresse (muzika staĝo) . Ĝi estis interesa ; pri la estonteco de la « Kvinpetalo » oni ne certas post la forpaso de G. Lagrange . Kolegoj de CM partoprenis la aranĝon de Plouézec kaj estis tre kontentaj . La retpaĝaro de la federacio progresas dank'al Christian Pinard kaj estas preskaŭ preta . Kataluna kaj transpirenea kongreso fine de oktobro : JH kuraĝigas al partopreno . Informoj aperis en SFS, la programo evoluas kaj pliriĉiĝas .

UFE-komitato : JH ne povos partopreni la septembran kunvenon ; neniun sin proponas por reprezenti nian federacion . Li ankaŭ anoncas projekton por la UK de Vilnius en 2005 : lui buson, kaj veturi tien en 4 tagoj, same por reveni . La prezo estus inter 220 kaj 300E, depende de la nombro da partoprenantoj (minimуме 30) . Eĉ kun la tranoktoj, la prezo estas pli favora ol veturi al Parizo kaj flugi al Litovio . Eble pli laciga vojaĝo sed kunvivado de esperantistoj, praktikado de la lingvo kaj malkovro de pluraj landoj . Pluraj ĉeestantoj interesiĝas . GS raportas pri sukcesa forumo de asocioj en Campagnan . Pro la dato meze de Aŭgusto kaj manko de homfortoj tiam, ne eblis prezenti budon en alia vilaĝo . Pri Clermont-l'Hérault venis negativa respondo (jam tro da lokaj asocioj) . Gratulojn al GS pro la provo . Aliaj forumoj disvolviĝos en Béziers, Montpellier, Lunel . Ĉiu organizanto ricevas centon da novaj faldfolioj (plibonigita eldono) . Turisma semajno en Salou : pluraj partoprenos ; informoj ne aperis en SFS, krom pri la datoj, tutsimple, ĉar neniun sendis informojn . Pluraj antaŭvidas partopreni la kongreson de Céret . Vizitoj : Flandraj Belgoj denove venos al Lozère, nova turneo de Bronstejn estas planata, la grupo de Montpellier kandidatos . *Fakte li limigos sin al la norda parto de Francio kaj ne venos al Montpellier* . Ĵomart kaj Nataŝa (el Kazahio) koncertos en Céret kaj serĉas aliajn lokojn por koncertumi poste . JH mencias, ke en Bilbao estis trovita solvo por la traduko en la francan de libro, verkita de du Katalunoj, kiuj rondiris la mondon en 80 tagoj kiel Phileas Fogg, kaj kiu jam aperis en la kataluna, la hispana kaj esperanto (ĉi-lasto dank'al la Ĉina ligo por esperanto kaj okaze de la UK) . Ĵak Le Puil registris KD, kiu estos aĉetebla en Céret . Koncerne la Zamenhofan tagon , ĝi ankaŭ signos la 40an datrevenon de la grupo de Béziers . JB proponas, ke Montpellier rezignu pri sia Z-tago, por ke la Z-tago en Béziers estu pli brila, dank'al la kuniĝo de la du grupoj . Afero distukinda inter la du grupoj . Fine, en la ĉapitro « diversaj » estas menciataj la problemoj de esperantistoj, kiuj ne aliĝas asocion kaj la propono de rilatoj kun Attac (MV) . Respondo al la propono : tio ne koncernas rekte la federacion, ĉiu decidu libere .

Post la federacia kunveno komenciĝas alia kunveno inter la grupanoj de Béziers por finprepari la forumon de asocioj (budo, materialo, deĵorhoroj, informiloj, ktp)...

Sudfrancia Stelo (SFS) : ni memorigas, ke la abontarifo por 2005 estos 7^E (kaj ne 6) . Kompense dufoje en la jaro estos iom pli dika bulteno . Pagu sufiĉe frue kaj sendu al la kasistino Lucette Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel (tel : 04 67 71 05 79) detalojn pri via pago . Se vi sendos rekte al la poŝtĉekkonto, ŝi ne scios de kiu venas la pago ! Vi povas ankaŭ profiti la okazon por donaci abonon al amiko, kiu eklernas la lingvon aŭ interesiĝas pri ĝi . ***Esperanto estas ĉies afero !***

En la grupoj

BEZIERS :

Bonan tagon ! Jen la nova lerneja jaro komenciĝas . Ni memorigas al vi la datojn de la venontaj kunvenoj, ĉiam sabate je la dekkvara horo en la MVA (Maison de la Vie Associative) .

25an de septembro : raporto pri la okazintaĵoj de la somero, precipe pri la Aleoj de la Asocioj, organizo de la kurso kaj de la Z-tago ,

16an de oktobro : Guy Carquet prezentos debaton pri « Etiko de Esperanto »,

13an de novembro : inter aliaj temoj, lastaj preparoj pri la Z-tago,

11an de decembro : Zamenhofa tago –Maison de la Vie Associative -15 Rue du Général Margueritte 34360 Béziers . Ekde la 10a horo akurate ni festos la **40an datrevenon de la starigo de CBE** (Cercle Biterrois d'Esperanto) en ĝoja etoso . Je la 12a, komuna tagmanĝo, ĉu en restoracio, ĉu surloke, kie ni povus organizi malvarman bufedon (*en restoracio estos pli solene, surloke ni gajnos tempon ! Respondu al tiu demando en la aliĝilo ĉi-sube*) Posttagmeze varietea programo . Ni kalkulos, por ke la festo finiĝu je la 17a horo .

Tre grava ! Montpellieranoj proponis organizi sian Z-feston samtempe kiel ni kaj kun ni en Béziers .

Kompreneble la CBE-anoj tute konsentas pri tiu agrabla afero, nur ili devas organizi la vojaĝon . Ĉiuj estos bonvenaj . Eĉ la ne-esperantistoj rajtas partopreni en tiu duobla festo .



Aliĝo al la Zamenhofa festo de la 11a de decembro 2004-10-01

Bonvolu fortranĉi kaj resendi antaŭ la 4a de decembro .

Nomo : Kromnomo :

Adreso :

Telefono/Telekopio/Retadreso :

Mi partoprenos en la Zamenhofa festo la 11an de decembro kun

Mi venos veturile kun

Mi alvenos vagonare en Béziers je la horo .

Ĉu vi deziras iri al restoracio ? JES NE Ĉu vi pli ŝatas bufedon ? JES NE (forstreku tion, kio ne plaĉas al vi) (Eblas grupigi plurajn personojn sur unu aliĝilo)

Bonvolu sendi al CBE 9, rue Georges Picot 34500 Béziers aŭ perrete al yarep@wanadoo.fr



MONTPELLIER :

Monata kunveno de la 11a de septembro en MPT L'Escoutaire :

Nur 14 partoprenantoj ĉeestis por la preparado de la Forumo de la Asocioj de la 12a de septembro en Antigone . La prezidantino A. Tora klarigis al ni kiel disdoni la dokumentojn pri nia lingvo, kion fari por akcepti la vizitantojn de nia budo, kiel interesigi ilin, ktp . Poste oni rememorigis la datojn de la venontaj kunvenoj en Escoutaire, ĉar la MPT modifis kelkajn . Do, ni **rekuniĝos la 9an de oktobro (NDLR : nuligita dato pro multaj forestoj), la 13an de novembro, la 4an de decembro, la 15an de januaro, la 12an de februaro, la 12an de marto, la 9an de aprilo (NDLR : problemo, ĉar tiam okazos la federacia kongreso en Lunel) kaj la 21an de majo 2005** . Ni rendezuas en Lunel la 19an de septembro por la forumo de asocioj kaj la 25an por la tago de malfermataj pordoj en MJC . La kursoj ekos en Escoutaire la 23an de septembro . Ni dankas Reine Celiqna pro ŝia helpo, ŝi zorgos pri niaj financoj . NDLR : Vidu ankaŭ la sekvantan paĝon pri la kursoj en Montpellier . La dokumento estis disdonita dum la forumo de asocioj (imitinde !)

Du samideaninoj forlasis nin .

Dumsomere forpasis *Marthe D'Urbal*, de longe fidela kaj aktiva membro de nia grupo . En la lastaj jaroj, pro sia sanstato, ŝi ne plu povis viziti la grupkunvenojn sed restis en rilatoj . Membroj de la grupo ĉeestis la funebran ceremonion .

Antaŭ nelonge atingis nin la malĝojiga anonco pri la forpaso de *Simone Bernard* en Bordojo . Multaj esperantistoj de nia regiono konis sin . Ŝi frekventis niajn staĝojn, ĉu en Béziers, ĉu en Sète, instruante malavare esperanton . Sindonema persono, ŝi multe agis en la regiono de Bordeaux . Granda ŝatantino de teatro, ŝi partoprenis en la prezentado de teatraĵo pri Brassens en Sète, okaze de la nacia kongreso en Agde . Ni kondolencas al ambaŭ familioj .



(4)

L'ESPERANTO à MONTPELLIER
ASSOCIATION CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER
Agréée par le Ministère de l'Education Nationale – Décret n°34-59
Siège Social : chez Mme TORA - 34070 MONTPELLIER (France)
CCP N° 1487 48 D Montpellier -T. 04 67 69 11 32

Pour tout renseignement, vous pouvez aussi vous adresser à :

Mme BES : tél.: 04 67 75 46 15
Mme BOCCADIFUOCO : tél.: 04 67 75 42 78
M. Claude CAYZAC : tél.: 04 67 59 55 74
M. ENSUQUE : tél.: 04 67 29 43 60 (dom.) ou 04 67 34 93 21 (bur.)
M.. MARTINEZ : tél.: 04 67 65 30 56

Une réunion mensuelle se tient, en début de mois, les samedis, à 10 heures à la Maison pour Tous de l'Escoutaire, rue des Razeteurs à MONTPELLIER.

COURS ORAUX L'horaire et le jour seront déterminés en fonction des inscriptions, mais sont déjà prévus :

- = *le Jeudi à l'Escoutaire à MONTPELLIER à partir de 9 h 00*
Responsables Mme BES et BOCCADIFUOCO
- = *le Mercredi de 9 H à 11 H 30 à LATTES- salles des Anciens Combattants- Bâtiment*
les Narcisses – responsable / M. MARTINEZ – Tél.:04 67 65 30 56
- = *à la D.R. France Télécom à MONTPELLIER - Responsable : M. ENSUQUE*
Horaire et jour à déterminer en fonction des inscriptions .

COURS PAR CORRESPONDANCE s'adresser à

- sur internet : <http://ikhurso.net> ou esperanto-jeunes.org ou encore lermu.net
- Claude CAYZAC au 04 67 59 55 74
- UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO : 4 bis, rue de la Cerisaie – 75004 paris – T. 01 42 78 68 86
- SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA – 67, avenue Gambetta – 75020 PARIS - T. 01 47 97 87 05

Informations Régionales:

- = "Semaine Internationale de SETE" (tous niveaux de cours) organisé fin août par l'association "Espéranto Culture et Progrès", tél.: Mme VIERNE - T. 04 67 54 15 43
- = Stage à VIAS (près AGDE (tous niveaux de cours) organisé en Mai par le Cercle Biterrois d'Espéranto -T. 04 67 31 13 18
- = Autres cours et stages organisés par l'Association "Réinsertion et Espéranto, T. 04 67 75 62 98
- = Vous pouvez contacter pour de plus amples renseignements aussi :
 - . la Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon-Beaugard-Route de Montacayroux -48500 LA CANOURGUE- Tél/Fax.: 0466328636- E-Mail : Jean.Henin@wanadoo.fr
 - . AUDE et P.O. : 04 68 55 51 77 (tél/fax)
 - . GARD- LOZERE : 04 66 32 86 36 (tél/fax)
 - . HERAULT : BEZIERS : 04 67 31 13 18- MONTPELLIER : / 04 67 69 11 32

Informations Nationales et internationales

- UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO : 4 bis, rue de la Cerisaie – 75004 paris – T. 01 42 78 68 86
- SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA – 67, avenue Gambetta – 75020 PARIS - T. 01 47 97 87 05

- sur internet ,tapez simplement le mot esperanto (sans accent) et vous aurez de nombreuses réponses ou consultez : <http://www-esperanto.france.org> ou esperanto.org/jefo ou encore esperanto-sat.info ou pour la région <http://esperanto-conflent.chez.tiscali.fr/federacio>

FORUMOJ

Ĉijare la nombro da forumoj kun esperantobudo plialtiĝis. Al Prades (en majo) aldoniĝis Campagnan en julio, Lunel en septembro kaj Béziers / Montpellier kiel kutime.


Campagnan

Campagnan estas vilaĝeto sur la flanko de monteto, laŭlonge de la ora valo apud Pézenas, Montagnac kaj Clermont l'Hérault. Oni vivas tie agrable en bonaj interhomaj rilatoj kaj inter la loĝantoj troviĝas kelkaj valoraj diletantartistoj en klasika kaj moderna pentrarto, potfarado, foto, fajenco, brodado, peckudrado, literaturo, lingvoj inter kiuj esperanto kaj ankoraŭ pliaj elektablecoj en la fakarto. Laŭ invito de la urbestro, ekspozicio estis organizita en la mirinda festsalono. Proksimume 25 budoj instaligis por prezenti kaj konatigi sian farsciadon. Kunlabore kun la E-grupo de Béziers kaj la regiona federacio, ni aranĝis larĝan budon kun libroj, dokumentoj, prospektoj, afiŝoj, aŭd- kaj vid-kasedoj, klariga tabulo pri la lingvo, flago, diversaj paneloj. Sabaton posttagmeze kaj la tutan dimanĉon, nia budo allogis multajn vizitantojn el la tuta regiono. Ofte ni devis ekspliki kio estas esperanto kaj montri la gravecon kaj avantaĝon paroli ĝin por komuniki tra Eŭropo kaj la tuta mondo, ne forgesante la facilecon por lerni ĝin. Ĉiufoje ni disdonis dokumentojn por pli komplete informi, oni multe parolis por persvadi. Ampleksa kaj vigla skipo relajse deĵoris (Jean-Pierre Peray, Line Maurel, Arie kaj Marlène Bouman, Gilbert Santos, Marithé Lemaire, Pierre Taupiac, Marie-Blanche Fondrillon, Remo kaj Renata Magnani, Jeannine Provost) kaj senĉese respondis al la multaj demandoj. Dum la du tagoj la informoj bone cirkulis inter la vizitantoj kaj kelkaj estis forte interesitaj kaj enskribigis por kursoj. Post tiu unua provo kaj la bona rezulto, necesas ripeti samajn manifestaciojn en diversaj partoj de niaj regionoj, pli ofte laŭeble, kun tiom da volo kaj alta grado, cele al la progresigo de E°. Multajn dankojn al la eksterordinara skipo !...kaj vivu nia bela lingvo "Esperanto" !

Gilbert

...kaj gratulojn al la iniciatinto !

Foto : Geknaboj atente auskultas la klarigojn



Béziers :

Sabaton, la 11an de septembro, la asocioj de Béziers kunvenis sur la Aleoĵ. Ni timis pri la vetero, sed feliĉe la suno aperis kaj ne venis la pluvo. Nia budo meze de la aleo estis ege bone lokita. Ek de la komenco, ni akceptis plurajn vizitantojn. Ĉiuj petis informilojn. Pluraj provis la elektronikan panelon kaj diskutis kun intereso pri la deveno, la estonteco kaj la pravigo de Esperanto. Nun ni posedas plurajn adresojn, por ke ni daŭrigu la rilatojn. Same kiel ĉiujare, tiu evento konigis esperanton al multaj loĝantoj de Béziers.

Marie-Blanche + Mado

"L'Hérault du Jour" rimarkis la esperanto-budon (dekstre) →

Montpellier :

2 kuraĝuloj ellitiĝis frue por starigi allogan budon. Multaj vizitantoj el tre diversaj landoj, eĉ el Brazilo, Ĉinio... kaj la kutimaj demandoj. Iuj tute ne konas esperanton, kelkaj havas falsan bildon aŭ antaŭjuĝon. La panelo kun la divido de la lingvoj aŭ la elektroni-ka panelo restas bonaj allogaĵoj por komenci dialogon kun la informigantoj. Ŝajnas, ke homoj pli kaj pli ofte konscias pri la lingvoproblemo en Eŭropo kaj la urĝo trovi kontentigan solvon. Pluraj personoj lasis sian adreson kaj oni planas du kursojn en Ĉiesdomo Georges Brassens, unu lunde kaj unu marde. (laŭ informoj ricevitaj)

Lunel :

Ni partigis la budon kun la MJC de Lunel, kies estrino metis al nia dispono senpagan lernoĉambron. Multaj vizitantoj parolis kun ni kaj ŝajnis tre interese-sataj. Unu semajnon post la forumo okazis la tago de « malfermataj pordoj » de la MJC. Ĉiu asocio disponis pri unu ronda tablo por akcepti informpe-tantojn. Ĉirkaŭ la nia sidis esperantistoj sed neniu vizitanto elmontriĝis ! Espereble venos novaj geler-nantoj por la unua kurso. Nia amiko Jorgo multe klopodis por diskonigi nian karan lingvon malgraŭ siaj sanproblemoj. Dankon al li ! Josée

Rimarkoj dum forumoj :

Junulo : « Génial, j' croyais qu'c' était une connerie. » Alivorte : la lingvo estas genie konstruita; mi supozis, ke estas utopiaĵo !

Singardemulo : Kiam esperanto estos sufiĉe disvastiĝinta, ĉu ĝi ne fariĝos hegemonia lingvo siavice ?

Kontraŭulo : Jam ekzistas 6000 lingvoj, ĉu utilas inventi plian ?

Kiel vi mem respondus al la du demandoj ?

Naivulo : Ĉu vi opinias, ke oni sukcesos paroli per tia lingvo ?

Samedi, les associations de Béziers ont une nouvelle fois investi les Allées Paul Riquet, pour présenter leurs activités, mais aussi tenter de convaincre de nouveaux adhérents.

Beaucoup de monde samedi sur les allées pour la traditionnelle manifestation de la rentrée associative « Les associations font les allées ».

De la diversité aussi pour cette rencontre annuelle. De la Colonie Espagnole, jusqu'à l'Appel des Cents, en passant par l'Espéranto, l'association France Algérie, ATD Quart Monde, ou encore le Centre Thierry Albouy, les visiteurs ont pu se faire une idée du tissu associatif biterrois. Peut-être, ont-ils pu aussi trouver une activité « extraprofessionnelle » à leur goût, pour égayeur ou enrichir leur quotidien ? Car là est bien évidemment l'enjeu de cette journée.

SOMERAJ EVENTOJ

Esperantistoj profitas la somerajn feriojn por vojaĝi en Esperantio, ĉu en Francio (Bouresse, Plouézec, Sète), ĉu eksterlande (Germanio, Hispanio, Ĉinio). Jen raportoj de federaciaĵoj, kiuj havis la okazon vojaĝi.


BOURESSE

Staĝo de 2 muzikistinoj el Béziers. Kiel en 2003, « Kvinpetalo » proponis staĝon pri « muziko kaj esperanto », de la 6a ĝis la 12a de aŭgusto. Line iris trajne ĝis Limoges, kie atendis ŝin Geneviève. De tie veturado ĝis Bouresse kun la 2 hundinoj de Geneviève. Partoprenis la staĝon 27 homoj, el Francio krom Nelly kaj Ramon el Barcelono, Stela, juna Koreanino, profesorino pri filozofio el Seoul. Ŝi estis vizitanta Francion kaj restis 4 tagojn. AnSofi Markov gvidis la staĝon, ĉefe la kantojn. Ni kantis multajn kantojn pri Paco, G. Lagrange estis tradukinta iujn el ili. Ni pensis pri li, ĉar lastjare li estis ankaŭ kun ni.

Estis multaj gemuzikistoj kaj oni laboris en malgrandaj grupoj. Tiel estis pli facile kaj ni ne ĉiuj ŝatis ludi la saman muzikon. Lino Markov (gitaro), 6 geflutistoj (Geneviève, Meva, Flora, M-Hélène, Annette, Yacine), mandolo (Line) laboris pri baroka muziko kaj muziko komponita de Lino. En tiu verko Geneviève estis solistino kaj M-Hélène ludis vjelon. Aliaj personoj preferis modernan, ĵazan, hispanan muzikojn. Ni opiniis, ke ni tro kantis. Ni bedaŭris, ke AnSofi ne parolis al ni pri muzikoj aŭ muzikistoj. Ŝi diris, ke se la staĝo ekzistos en 2005 (se la junaj muzikistoj estos liberaj), ni malpli kantas kaj ni pli kunvenos pri diversaj muzikaj temoj. La etoso estis tre agrabla, la nutraĵo bona (ĉefe la konfitaĵoj preparitaj de Suzanne). La dometo « Jeanine Vincent » estis preskaŭ preta; verŝajne en 2005 ni manĝos en tiu loko.

Ni parolis en esperanto konstante. En la florantaj ĝardenoj, 7 katoj dormis aŭ promenis. Unufoje la maljuna hundino Elsa eniris la korton sed ĝi ne batalis kun la katoj, ĉiuj estis pacamaj bestoj. La vetero taŭgis por bone labori, nek tro varma, nek tro pluva. La fulmotondroj ne longtempe daŭris. La lastan tagon ni donis nian koncerton, antaŭ kaj post la manĝo.

Serge Sire, klarinetisto, ĵazis kun Gitu (gitaro), Samir (basgitaro) kaj Serge registris la koncerton. Evidente, ni aĉetis kaj aŭdos ĝin kun granda plezuro. Post la koncerto ni manĝis kukojn kaj trinkis cidron. Multaj staĝanoj foriris, kelkaj daŭrigis la restadon. Ni restis 2 tagojn pliajn. La unuan ni iris al Montmorillon. Ni vizitis la malnovan urbon kaj « la cité de l'écrit » (la civiton de skribaĵoj). Ni trovis librobrokantistojn, pentraĵojn kaj magazenojn pri diversaj specoj da paperoj. La duan tagon, ni vizitis la belegan « abatmonaĥejon » de St Savin, en kiu troviĝas rimarkindaj bonstataj freskoj de la 11a jarcento. Ankaŭ ni vizitis la preĝejojn de Antigny kaj Chauvigny kaj malnovajn kastelojn, ankaŭ la malgrandajn neolitikajn prifosadojn de Citeaux. Poste ni reveturis al Limoges. Line trajnis ĝis Béziers, Geneviève daŭrigis siajn feriojn en Aveyron. Ni ŝatus reiri al la staĝejo « Kvinpetalo » en 2005 por muziki, esperantumi, promeni en tiu bela regiono. (Geneviève + Line)



Serge Sire, klarinetisto, ankaŭ konata pro siaj bildstrioj.

En Julio mi ankaŭ vizitis Bouresse, kun mia nepino Emma, 11jaraĝa. Ŝi neniam volis aŭdi ion ajn pri esperanto pli frue sed, kun la helpo de Flora Markov, 15jaraĝa, denaska esperantistino, ŝi lernis la alfabeton en esperanto kaj skeĉojn. Serge Sire registris kompaktdiskon, kie Emma komencas, kantante « Frato Jako ». Eble tiu sperto vekos novan esperantistinon... (Josée)

SOMERA SEMAJNO...en SOMERE.


Ĉijare, en Germanio, okazis la dua SOMERE (Somera Mezeŭropa Renkontiĝo). Tio okazis en Kall-Krekel, de la 26a de julio ĝis la 8a de aŭgusto. Kall-Krekel estas vilaĝeto en la kamparo, malproksime de ĉio, tamen staras du hoteloj. Ni loĝis en domo de religiaj skoltroj, kiu entenis preĝejeton kun harmoniumo, kiu ebligis koncerton.

Aliĝis 60 homoj: gepatroj kun infanoj, kelkaj por la tuta restado, aliaj nur por unu semajno. La etoso estis tre internacia (Rusoj, Nederlandanoj, Ĉinino, Belgoj, Francioj kaj kompreneble Germanoj...). Mirinde, la Germanoj, eĉ inter si, parolas nur esperanton, do ne estis krokodiluloj, escepte de kelkaj Francioj.

Ni vivis laŭ la germankampana kutimo, t.e. ni ne tre bone manĝis, sufiĉe jes, tre bone ne. Multe da industria porkaĵo, sen vino, kaj kun industria pano. En la komenco tio estis iomete priridata sed post pluraj tagoj kun tia dieto, la rideto foriris.

Vidindaĵoj: montaro kun abioj, abioj kaj abioj, la ĉirkaŭvilaĝetoj tute banalaj.

Tamen, ni venis nek por la manĝoj, nek por la vidindaĵoj, por kio nu? Por la homoj, ĉu ne? Pri tiu-ĉi lasta punkto, ĉio iris bone. Matene okazis kursoj; la nia estis gvidata de Rusino, kiu bone paroligis kaj ridigis nin, posttagmeze ni promenis tra la arbaro, aŭ en la aliaj urbetoj, vespere okazis pluraj distraĵoj (ŝakludoj, kampofajroj kun kantadoj... kaj diskutadoj ĉirkaŭ brando aŭ biero. Oni povas vidi fotojn sur la sekvanta retadreso: <http://www.gcnet.ru/gecxjo/SOMERE-2/> (Evelyne kaj Nikolao)



SOMERAJ EVENTOJ

SKOLTOJ (« Eclaireuses et Eclaireurs de France »)

La 28an de aŭgusto 2004, la « Eclaireuses et Eclaireurs de France » invitis esperantistojn al sia vilaĝeto Becours (12). Tie la temo estis la lingva esprimado : kantado, okcitanaj rakontoj, spontana parolado, ŝaradoj, hispana lingvo...kaj esperanto.

Vendredon vespere Monique kaj Francis estis surloke por prepari la budon. La tri aliaj de CBE (grupo de Béziers) : Mado, Marithé kaj Marie-Blanche kunvenis sabaton matene ; ĉiuj estis tutkore akceptitaj, en belega sovaĝa pejzaĝo. La movado EEF antikvamaniere rekonstruis tiun ruiniĝintan kaj de longe forlasitan vilaĝeton. Ni akceptis plurajn vizitantojn kaj havis kune interesajn interparoladojn. Pluraj eksterlandanoj partoprenis en tiu kunveno, ĉar tiu movado estas internacia, do la organizantoj konscias pri la graveco de internacia neŭtrala lingvo kiel interkomunikilo. Pro tio Esperanto ŝajnas tre utila.

Fine de la posttagmezo ni kantis « Frato Jako » kune kun ĉiuj partoprenantoj de la sperta kantgrupo, kiu bonvole kaj atente lernis la esperantajn parolojn. Ili demandis pri esperanto, ĝia historio kaj ĝeneralaj reguloj. La gerespondecoj intencas daŭrigi estonte la interrilatojn. Nova renkonto estas proponita venontan novembron. La 5 partoprenintoj.

NDLR : Gratulojn al la kvinopo, legu ankaŭ pri EEF sur paĝo 2a.

SETE : 30a internacia semajno de Esperanto (de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto 2004)

Preskaŭ tradicie okazis la internacia semajno de Sète en la feriejo « Le Lazaret ». Estas fakte jam la 30a fojo, kiam Yvette Vierne kaj helpantoj organizas tiun regulan renkontiĝon. Tri nivelkursoj estis proponitaj. Josée Boccadifuoco gvidis kun granda energio la kurson por komencantoj. Jean-Pierre Péray prizorgis humure sed serioze la paroligan kurson, kiu kunigis la plejmulton da partoprenantoj kaj Renée Triolle kun granda sperto transdonis siajn sciojn dum la perfektiga kurso.

Ni havis la grandan ĝojon akcepti familiojn kun infanoj (6 kun malpli ol 13jaroj) kaj malgraŭ la varmego anoncita, 42 personoj kunvenis en la arbombro de la parko kaj sub la suno de la maro, je 30 metroj de la loĝejoj. Du grandaj tabloj akceptis nin dum la tre konversaciemaj manĝoj ekstere. Vespere, diversaj kunvenoj estis proponitaj por debati, vidi filmojn kaj teatraĵojn, kaj kelkaj vizitis la urbon kaj partoprenis en la urba animado, ĉar en la sama periodo oni festis Sanktan Ludovikon, la protektanton de la urbo.

Bona konkludo de nia semajno estas la ekzamenoj. Du provis la unuagradan, unu la duagradan kaj unu la Kapablecon. Ni antaŭvidas bonajn sukcesojn.

Post tiu agrabla semajno ĉiuj foriris hejmen kaj multaj promesis reveni venontan jaron de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto 2005 en Sète. Vi jam povas kontakti nin :

ESPERANTO, KULTURO kaj PROGRESO 5, rue du Dr Roux 34090 MONTPELLIER

Tel/Fakso : 04 67 54 15 43 Retadreso : jf.passarella@free.fr <http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>

Bildo : tri konataj vizaĝoj de la internacia semajno. De maldekstre Jorgos, Renée Triolle kaj Yvette Vierne



Finiĝas la jaro 2004, alproksimiĝas la jaro 2005. Kial ne jam antaŭvidi partoprenon en niaj « semajnoj » aŭ proponi al geamikoj partopreni ? La sukceso de la semajnoj ankaŭ dependas de vi. Esperanto, ĉies afero.
